

La Sutro "Graco de Gepatroj"

Tiel mi aŭdis. Iam Budho restis kun bodisattoj kaj disĉiploj sur la monto Aglo-pinto en la regiono Raĝagaha. Tie kolektiĝis samganoj, kredantoj, ĉiuj ĉieluloj, nagaraĝoj, diuloj k.a. por aŭskulti Budhan predikon. Ili ĉirkaŭsidis kaj fikse adorrigardis Lin je la vizaĝo.

Tiam Budho komencis prediki la instruon. "Karaj filoj kaj filinoj! La patro havas favoron kaj la patrino havas kompaton. Ĉar vi naskiĝis en la mondon pro karmo kiel kaŭzo, per gepatroj kiel motivo. Sen la patro vi ne ekestis, sen la patrino vi ne kreskis. Vi ricevis animon de la patra semo, kaj la korpon vi formis en la patrina sino. Pro tio la kompatato de la patrino estas nekompareble alta en la mondo kaj ĝi komenciĝis jam antaŭ via naskiĝo."

"De kiam vi ekestis en la sino, 10 monatojn la patrino ricevis diversajn suferojn en ĉiuj tagoj. Ĉar la suferoj ne paŭzas, la patrino ne sentis deziron al eĉ ŝatataj manĝaĵoj aŭ vestoj. Ŝi esperis nur la sekuran akuŝon. Kiam venis la tempo akuŝi post necesaj tagoj, la karma vento stimulus la akuŝon. Ŝin dolorigis ĉiuj ostoj kaj artikoj, graseca ŝivito elfluis kaj daŭris neeltenebla suferego. Ankaŭ la patro timegis pri la patrino kaj infaneto, kaj ĉiuj familianoj kaj parencoj same timis. Fakte kiam vi naskiĝis, la ĝojo de la gepatroj estis senfina, kvazaŭ malriĉulo hazarde prenis mani-juvelon. Kiam vi eligis voĉon unuafoje, la patrino ankaŭ sentis ĝojegon tiel, ke ŝi mem naskiĝis en la mondon."

"De tiam vi dormis ĉe la brusto de la patrino, ludis sur ŝiaj genuoj, nutriĝis per ŝiaj mamoj, nome, vi vivis de la patrina graco. Kiam vi malsatiĝis, vi ne manĝis krom nur la mano de la patrino. Kiam vi soifas, vi ne trinkis krom de la patrino. Kiam malvarme, por aldoni vestojn vi surportis nur per la mano de la patrino. Kiam varme, vi demetis vestojn nur fare de la patrino. Kaj kiam eĉ la patrino malsatas, ŝi donis al vi sian porcion eĉ jam maĉitan. Kiam eĉ se la patrino suferas de malvarmo, ŝi kovris vin per vestoj demetitnte de si mem. Vin nutris neniu krom la patrino. Vin vartis neniu krom la patrino. Ĝis kiam vi forlasis la infan-ĉaron, kiom foje ŝiaj fingroj malpuriĝis pro vi. Se oni mezurus la kvanton de la lakto, kiun infano trinkas de la patrina mammo, ĝi atingas 180 kokuojn. La granda favoro de gepatroj egalas la ĉielon senfina."

"La patrino, dungite de najbaroj, laboras en diversaj okupoj; ĉerpi akvon, kuiri, elŝeligi grajnon, mueli k.a. Kaj malgraŭ, ke ankoraŭ ne venis la tempo foriri, ekpensinte, ĉu nun vi plor-krius en la hejmo, sopirus ŝin, la patrino ne povas deteni sin reniri pro obseda maltrankvilo kun elfluonta lakto de la mammoj. Pro tio la patrino kun forpermeso reniras al la hejmo. La infaneto, de malproksime trovinte, ke la patrino venas, svingas la kapon en infan-ĉaro, aŭ alrampas en la direkto al ŝi kun falsa ploro. Ankaŭ ŝi rapidas klinante sin antaŭen, etendas la manojn kaj forbalaas la

vestojn. Kai post kiso ŝi donas la lakton al ĝi. Tiam la patrino ĝojas por vi, ankaŭ ĝi ĝojas pro ŝi. Ambaŭ sentoj ĉi tie akordiĝas. Neniu alia amo estas komparebla al la akordiĝinta kunsento.”

“En la dua jaraĝo. Vi ekpaŝis unuan fojon el de la patrina brusto. Vi lernis, ke fajro bruligus vin, nur de la patro, kaj ke tranĉilo vundus vin je la fingro, nur de la patrino. En la tria jaraĝo. Vi ekmanĝis krom la lakto. Vi lernis, ke veneno mortigus vin, nur de la patro, kaj ke medikamento savas vin de malsano, nur de la patrino.”

“Kiam la patro estis invitita al festenoj kaj ricevis bongustan kukon, ne povas ĝin gustumi li sola. Pro tio li reniras heimen portante ĝin, kaj donas al la infano. La patro kunportas kukon preskaŭ 9 fojojn por 10 invitoj. Akirinte la kukon la infano

ĵojkrie manĝas kaj ridas. Sed kiam la infano ne povas gajni ĝin, false plore krias, kaj plendas al la patro kaj riproĉas al la patrino.”

“Tom kreskinte la infano fariĝis knabo. Kiam li ekhavis amikojn, la patro serĉas vestojn kaj aĉetas zonojn por li. La patrino kombas kaj brosas la hararon. La gepatroj donas kaj vestas de ili ŝatatajn vestojn al la knabo, dume ili vestiĝas malnovajn vestojn, portas riparitajn robojn.”

“De kiam li edziĝis al virino de alia familio, li ignoras la gepatrojn, kaj la novaj geedzoj aparte intimiĝas kaj ĝoje interparolas en sia ĉambro. Kaj kiam la gepatroj maljuniĝis, pro sia malfortiĝo ili esperas helpon nur de la filo, konfidon de la bofilino. Tamen, la geedzoj ne vizitas la gepatrojn eĉ unu fojon.”

“Post kiam la patro aŭ la patrino forokulis la kunulon, la sola loĝado similas al provizora tranokto en sol-vojaĝo, en kiu ne troviĝas konsolo nek amuzo interparoli. Nokte la litaĵo estas malvarma, la korpo ne ripozas, des pli pro puloj kaj pedikoj li ne povas ekdormi ĝis mateno. Multfoje sin turnante en litaĵo li murmuris “Ah! Pro kia peko mi devas havi tian malfidelan filon?”

“Kiam li vokis la filon pro ia afero, la filo venis sed senkiale li koleras kun indignaj okuloj, ankaŭ la edzino kaj iliaj infanoj kune koleras, insultas kaj subridas vidante malsupren. La edzino ankaŭ estas mallojala, la nepoj ankaŭ estas malobeemaj. La junaj geedzoj senatente faligis sin en la 5 pezajn pekojn. Aliokaze, kiam la patr(in)o volis ordoni ion pro ia hasta afero, la filo ne venas 9 fojojn en 10 okazoj, kaj finfine ne servas por li(ŝi). Male, la filo kolere diras “Estas pli bone frue morti, ol resti sur la tero post kadukiĝo.”

“Tion aŭdinte la patro pro indigno kaj konfuzo, kun impetantaj larmoj lamente krias ‘Ah! Kiam vi estis infano nur de mi nutriĝi, nur de mi vartiĝi. Sed tamen, nun vi estas tia! Ah! Naski vin estas mia eraro!’

“Kiel filo, se li igis la gepatrojn elvoĉigi tiajn vortojn, pro la vortoj li enfalos en narakan, avidan aŭ bestian medion. Neniu tategatoj, vaĝra-sattoj aŭ diuloj povas lin savi nek gardi. La granda favoro de gepatroj egalas la ĉielon senfina.”

“Karaj filoj kaj filinoj! Se mi analizas la favoron de gepatroj, mi dividu ĝin en 10 artikolojn. Kiuj estas tiuj 10?

La 1-a estas la favoro gardi embrion.

La 2-a estas la favoro suferi pro nasko.

La 3-a estas la favoro forgesi la suferon pro naskito.

La 4-a estas la favoro nutri kaj varti.

La 5-a estas la favoro cedi sekan lokon al naskito kaj kuŝi sur la malseka lito.

La 6-a estas la favoro lavi malpuraĵojn.

La 7-a estas la favoro doni dolĉaĵojn, sed mem engluti la maldolĉan.

La 8-a estas la favoro senhezite fari malbonojn por infano.

La 9-a estas la favoro time atendi infanon vizitanta malproksimen.

La 10-a estas la favoro kompati senlime ĉe iu ajn okazoj.

La granda favoro de gepatroj egalas la ĉielon senfina.”

“Karaj filoj kaj filinoj! Kiel ni rekompencu por tiel granda favoro!? Budho predikis per versaĵo. Kiam la kompata patrino gravediĝis, ŝi ekdonadis sian sangon kaj karnon al embrio dum 10 monatoj, kaj mem sentas sin grave malsana. De tiuj donaĵoj ŝi kreskigas la embrion. Kiam kaj la tempo venis, tiam karma vento stimulas al ŝi akuŝon. Samtempe ŝia tuta korpo forte doloras, ĉiuj ostoj kaj artikoj kvazaŭ disrompiĝus, la animo perturbiĝas kaj preskaŭ svenas. ---sed se la akuŝo bonorde iras, ŝi kvazaŭ reviviĝus. Kiam ŝi unue aŭdis la voĉon de la infaneto, ankaŭ ŝi sentas sin, ke ŝi mem denove naskiĝis. Kiam ŝi fariĝis juna patrino, la vizaĝo aspektas flora, sed post kiam la jaroj pasis por prizorgi la infanon, la floro ŝrumpas.”

“En noktoj prujnaj kvazaŭ en malvarma akvo aŭ en frumatemoj neĝaj kiel glacio la patrino interŝanĝe cedas al la infaneto sekan parton de la litaĵo, kaj ŝi mem kuŝas sur la malseka. Ankaŭ kiam la infaneto fekis sur ŝia brusto aŭ pisis sur la vesto, ŝi propramane lavas, sed neniam eskapas de la fetoraĵoj. Elektinte manĝaĵojn la patrino donas al la infaneto nur la dorĉan parton, sed ŝi englutas la maldorĉan.

Se ne troviĝas alia rimedo por savi la infaneton, la gepatroj senhezite faras malbonojn, kaj ne timas enfali en narakon. Kiam la filo vizitas iun malproksimen, la gepatroj estas maltrankvilaj, ĝis kiam ili revidis lian vizaĝon. Ili atendas lin en aŭ ekster la domo, timas iam ajn. (Okaze de krizo) ili estas pretaj anstataŭigi sin por la filo, dum ili vivas. Post la morto ili volas protekti la filon de la transa mondo.”

“Kiamaniere ni povas rekompenci por tiel granda favoro de gepatroj!?”

“Malĝraŭ en tia favoro, kiam la fil(in)o maturiĝis, ne obeas la vortojn de la patro kun kruda voĉo, kaj ne sekvas la patrinon kun kolera mieno. Post la edziĝo li fariĝas kontraŭa al la gepatroj kvazaŭ li ne rilatus al la favoro. Li malamas siajn gefratojn kvazaŭ ili estas malbenindaj. Sed kiam vizitis lin la familianoj de la edzino, li vonvenigas kaj regas ilin, kompleze interbabilas kun ridetoj en sia ĉambro. Ho ve! Li sintenas kontraŭe, por la intimaj malamike, sed por la negravaj tre amike. La

granda favoro de gepatroj egalas la ĉielon senfina.”

Tiam Ananda ekstaris, elmetinte la dekstran ŝultron kaj kunpolmigante marŝis genue antaŭ Budhon. Li demandis “Bagavato nia! Kiamaniere ni, ŝramanoj, rekompencu la gepatrojn por tiel granda favoro? Volu detale montru, ni petas”.

Budho montris. “Kunvenintoj, vi klare aŭskultu! Pri la fideleco troviĝas nenio aparta por ŝramano aŭ laiko. Kiam vi enmanigis al vi novan frandaĵon de ekstere, regalu per ĝi la gepatrojn. Tiam ili ĝojos pro ĝi, ne rekte prenos, sed unue oferos ĝin al la tri juveloj. Tio estas la komenco de la bodi-koro.”

“Kiam la patro malsanas, vi mem flegu ĉiam ĉe la lito. Neniam kaj nenion vi komisiu la flegadon al aliaj homoj. Laŭtempe demandu lin, ĉu io necesa kaj kompleze instigu por manĝi. Trovinte la fidelecon de la filo la patro sintrude ekmanĝos, kaj trovinte tion vi konos vin prava. Se la patro dormis dumtempe, vi ekzamenu la spiradon, kaj se li vekiĝis, vi donu medikamenton konsultante kuraciston. Tage kaj nokte preĝu je la tri juveloj por la resaniĝo, kaj ĉiam tenu la dankan koron kaj neniam ĝin forgesu.”

Tiam Ananda denove demandis. “Bagavato nia! Ĉu tiuj manieroj estas sufiĉaj por ŝramanoj rekompenci la favoron?”

Budho instruis. “Ne. Ankoraŭ ne sufiĉas. Se la gepatroj ne obeus la tri juvelojn pro sia obstinemo, difektus aĵojn sen zorgemo, ŝtelus sen justeco, adultus sen moralo, perfidus sen konfido, drinkus sen saĝo, tiam kiel filo vi devas forte deadmoni kaj veki ilin al virto. Sed se ili ankoraŭ ne vekiĝas pro sia tenebro, vi devas savi ilin de la estonta sufero rakontante alegorion, aliajn ekzemplojn aŭ montrante principon de kaŭzo kaj rezulto. Sed se la gepatroj ankoraŭ plu ne ŝanĝus la sintenon pro la obstinemo, vi forte ploru kaj ĉesu manĝi kaj trinki. Sekve de tio, spite al la persista obstinemo ili perforte sin konvertos pro la amo al la filo timante, ke li mortus.”

“Se la gepatroj ŝanĝis la koron, kaj akceptis la 5 ŝilojn, nome, ne mortigi pro humanismo, ne ŝteli pro justeco, ne adulti pro moralo, ne mensogi pro konfido kaj ne ebrii pro saĝo, tio rezultas harmonion en la hejmo, nome, gepatroj estas favoraj, gefiloj estas fidelaj, edzo justa, edzino modesta, tiel la tuta familio konkordas kaj dungitoj estas honestaj. Kaj pro tio la harmonio etendiĝas ĝis brutoj, insektoj eĉ fiŝoj. Tian familion senescepte respektas kaj amas ĉiuj budhoj en la tuta mondo, la ĉieluloj, nagaraĝoj, alimonduloj, diuloj, la voj-irantoj, de nobeloj ĝis plebanoj. Pro tio neniuj, nome, kanajloj, flatuloj, sovaĝuloj, malĉastulinoj kaj diversaj fantomoj, ne povas interveni. Kaj en tio la gepatroj povas vivi komforte, transnaskiĝi en bonan lokon de la transa mondo, renkonti budhon, aŭskulti la predikon kaj eliri el la suferaj renaskiĝoj. Post tiu procedo apenaŭ vi estas nomata lojala persono, kiu rekompencas la gepatrojn por la favoro.”

Budho plue instruis. “Vi, ĉiuj kunvenintoj, atente aŭskultu! Eĉ se vi klopodus regali la gepatrojn per bongustaĵoj, belaj muzikoj, fajnaj vestoj, komfortaj vetriloj kaj luksaj domoj, kaj ne tedigas ilin per tiuj dum la tuta vivdaŭro, sed se vi ne povas kredigi la

tri juvelojn al ili, vi ankoraŭ ne estas lojala al la gepatroj, mi diras.

Kial? Eĉ se oni estas oferema pro la altruismemo, deca pro la ĝentileco, deteni sin pro la mildeco, virta per la diligentemo, tenadi la koron kvieta kaj instigi sin al scienco, sed se eĉ unu fojon li dronis en vinon aŭ eroton, tuj Marao enŝteliĝas, demonoj ekkonas lin, kaj igas lin malŝparema, diboĉema, kolerema kaj mal-diligentema. Ili ankaŭ perturbas lian koron, malklarigas lian saĝon kaj igas lin je konduto kiel bestion.

Fratuloj! de malmova tempo ĝis hodiaŭ multaj homoj perdis la renomon, pereigis sian klanon, ruinigis la regnon, hontigis la gepatrojn. Pro tio ŝramano devas vivi sola sen edzino kaj puranime laŭir <la vojon>. Kiel filo, vi devas distingi, kio estas grava aŭ ne, tuj necesa aŭ ne, por la gepatroj profunde kaj vaste pensinte. Tion mi nomas 'rekompenci la gepatrojn'."

Tiam Ananda ekstaris forviŝinte la larmojn kaj kunpolmigante marŝis genue antaŭ Budhon. Li demandis "Bagavato nia! Kiel Vi nomas ĉi instruon? Kaj kiel ni ĝin tenadu?"

Budho respondis li. "Ananda. Mi nomas la instruon <La Sutro de Granda Favoro de Gepatroj>. Se oni legas ĉi sutron eĉ unu fojon, tio validas kiel rekompenco por la favoro de la lakto-vartado. Kaj se li ĉiam tenadas la sutron en la koro kaj igas aliulojn tenadi ĝin, vi sciu, li estas rigardata, kiu rekompencas la gepatrojn por la donita favoro. Kaj estingiĝos for eĉ ĉiuj pezaj pekoj, t.e. la 10 malbonaj, la 5 spitaj kaj la narako-klasa dum la tuta vivdaŭro, kaj li povas marŝi en <la plej alta vojo>."

Tiam la ĉieluloj Brahma, Indra, la aliaj kaj homoj, t.e. ĉiuj kunvenintoj ekhavis la bodi-koron aŭskultinte la predikon. Kaj ili riverencis tutkorpe, faligis larmojn kvazaŭ pluvon, kaj salutis Budhon je la piedoj kaj ĵuris praktiki la instruon kun ĝojo.